

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

N-o 53, 9. okt. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

## The Esperanto Service Corporation.

Fondo de Esperanto-Servo de Nordameriko laŭ komercaj metodoj.

Esperanto-Servo-Korporacio (ESKO) estas starigita la 27-an de junio 1921 de kelkaj amikoj de la esp. movado en Usono, kiuj decidis, aranĝi la propagandon de Esperanto en Nordameriko laŭ komercaj metodoj, ĉar ili konvinkigis, ke tio estas la sola vojo por efike antaŭenpuŝi Esperanton. La oficistoj de la korporacio estas: prez. s-o J. J. Süssmuth LK, vicprez. s-o J. D. Sayers, kas. s-o N. Sadagursky, sekr. s-o C. C. Coigne. La kapitalo estas fiksita je 100 000 dolaroj, el kiuj ĝis nun estas signitaj 2800 dolaroj.

ESKO mem klarigas la celojn kaj principojn de la korporacio per sekvantaj malmultaj vortoj: ESKO estas pure komerca entrepreno, celanta disvastigi kaj popularigi la internacian lingvon en Nordameriko, sed precipe provante utiligi Esperanton al tiuj personoj, kies afero aŭ intereso havas internacian amplekson. Nia unua tasko celas starigi kaj plene ekipi centran informojn kaj oficejon en New York City, al kiu povos sin turni ĉiu nordamerika esperantisto deziranta informon aŭ helpon pri kiu ajn fazo de la esp. movado tie ĉi aŭ en aliaj landoj; kaj de kiu ankaŭ eksterlanda samideano povos ricevi tute fidindan informon pri Nordameriko, ĝiaj industrio, komerco, transportoj ktp. Por atingi tiujn altajn celojn, ni bezonas la kunlaboron de agemaj esperantistoj ĉie en la mondo, kaj ni multe deziras trovi en diversaj landoj taŭgajn samideanojn, kies inteligento kaj eduko kapabligas ilin kunlabori kun ni. Ni invitas klubsekretariojn, UEA-delegitojn kaj aliajn samideanojn aktivajn en la movado, korespondadi kun ni. Al ĉiuj ni donos pluajn detalojn pri nia programo kaj montros ĝuste, en kiu oni povos nin plej efike helpi.

La korporacio jam havas reprezentanton en Germanio: s-o Norbert Barthelness, Immermannstr. 26, Düsseldorf. Aliaj reprezentantoj en Eŭropo kaj Sudameriko estos baldaŭ elektataj.

ESKO ankaŭ reprezentas ET, kaj ni petas ĉiujn abonantojn en Nordameriko estonte daŭrigi sian abonon nur ĉe ESKO. Abonprezo por 52 numeroj: 3 dolaroj.

Adreso de ESKO: 500 Fifth Avenue, New York City.

### La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.  
Tradukite laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro  
Maria Ŝidlovskaja.

(55-a daŭrigo.)

„Ho, well!“ angle diris la gardisto kaj tuj komencis klarigi al Mateo, ke Ameriko estas pli granda ol la tuta mondo, „ĉiu ja tion scias, — Nov-Jorko estas la plej granda urbo en Ameriko, kaj ĉi tiu ponto estas la plej granda en Nov-Jorko“.

Poste la gardisto ekrigardis en la okulojn de l' stranga viro, vidis en ili angoron anstataŭ admiro, kaj liaj pensoj prenis alian direkton: certe, se al homo la vivo fariĝis jam senvalora, devas esti agrable sin jefi de sur la plej granda ponto de l' mondo; sed unue, — tio estas malfacile farebla, — kiamaniere li transrampus tiun reton da metalfadenoj kaj ŝnuregoj? — due, la pontego ne estas konstruita por tiaj faroj.

Ĉion ĉi tion la gardisto klarigis al Mateo, poste li energie returnenirigis lin kaj akompanis lin, puŝetante de malantaŭe. Cetere la stranga viro iris senkontraŭstare, kvazaŭ streĉita maŝino, tien, kie super la urbo staris fajrorebrilo kaj kie ringo da elektraj fajroj kiel krono pendis en la aero super la konstruaĵo de l' gazeta redakcio.

Sur la strato li jam ne invitite envagoniĝis. Oportuna benko kaj egalmezura movado de l' vagono nevole allogis la senrifugulon, sed kien veturi — por li nun estis tute indiferente. Veturi, nur veturi! Kiam ajn malproksimen, pri nenio pensante, por ke ripozu la lacaj piedoj, por ke venu dormeto sub akompano de egalmezura tamburado de l' radoj.

Al li estis tre malagrabla, kiam la tamburado subite ĉesis, kaj antaŭ li staris la konduktoro,

**Les Echos\*)**  
granda franca komerca revuo propagandas Esperanton.

En ET n-o 44 s-o Roma Guardiet faris tre atentindan proponon, laŭ kiu je unu sama dato ĉiuj esp. unuigoj disdonu flugfolion al la komercistoj en ĉiu grava urbo, proponante la tradukon de sendotaj leteroj kaj retradukon de ricevotaj leteroj, tute senpage, kio estus farota de esp. societoj aŭ de sindonemaj esperantistoj. Se ni sukcesus, per tia procedo vekli la intereson de la komercistoj, nia ideo jam estus duone venkinta.

Sed ĉu ĉe la nuna sistemo de nia organizo, ĉe la senhaveco de niaj asocioj, ĉe la ne sufiĉa solidareco inter la anoj de la mondlingva movado ni povus efektiviĝi nuntempe la proponon de s-o R. G. aŭ ian ajn alian proponon, kiu — efektiviĝite — signifus la venkon de nia movado, ĉi tion ni multe pridubas.

Porta organizo, mono kaj solidareco — jen kio mankas kaj kion ĉiu el ni devus aspiri al nia movado.

Similan proponon kiel tiun de s-o R. G. ni nun trovis en la grava franca komerca revuo „Les Echos“ de 14. sept., kaj speciale grave estas, ke tiun proponon — laŭ instigo de s-o Rollet de l'Isle, oficiro de la Honora Legio — faras la redakcio mem al siaj abonantoj.

La revuo „Les Echos“ proponas per siaj abonantoj, tradukante esperanten iliajn leterojn kaj dokumentojn france verkitajn, kaj reciproke tradukante francen la esperante verkitajn leterojn, kiujn ili ricevos.

Dank' al la helpo de „Les Echos“, la francaj komercaj firmoj do povos kunlabori je la vulgarigado de la internacia komerca lingvo. Por atingi tiun celon, „Les Echos“ konsilas al la komercistoj, ke ili konigu al siaj alilandaj korespondantoj sian pretecon uzi Esperanton, per la frazo: „Oni korespondas per Esperanto“ skribita en la titoloj de iliaj leteroj, sur iliaj dokumentoj, reklamoj ktp.

\*) Se lu deziras ricevi specimenan numeron de „Les Echos“, li povas peti ĝin laŭ la adreso 2-4, rue Martel, Paris, aldonante — por ricevo — unu frankon laŭ la valuto.

preninte lin je maniko. Li ree elpoŝigis monon, sed la konduktoro ion diris kaj per mansigno montris, ke estas necese elvagoniĝi.

Mateo obeis, kaj la malplena vagono tel gaje ekruliĝis, farante rondturnon. La konduktoro estingis jam la lampojn, la fenestroj de la vagono dronis en mallumo, kaj baldaŭ Mateo vidis la vagonon enruligantan en korton kaj haltantan sub la tegmento de l' tenejo, kie en mallumo jam estis ripozantaj aliaj tramvagonoj.

Plena senbrueco! La luno iĝis tute malgranda, kaj la blua nokto estis sufiĉe malluma, kvankam steloj vidiĝis en la ĉielo, kaj la granda placo antaŭ Centra Parko malklare briletis sub la arĝentaj lunradioj. Maloftaj negrandaj domoj staris alterne kun longaj palisaroj kaj lokoj senkonstruataj, kaj nur en unu loko iu fierulo konstruigis deksetaĝan domegon, kiu altiĝis kiel nigra kolono, ankoraŭ ĉirkaŭita per trabaro. Ĉi tiu Babela turo akre konturis en la fajrorebrilo de la lumigita urbejo.

La oreloj de Mateo distingis bruaĵon de arboj. Arbaro ĉiam allogas senrifugulon, kaj Mateo Lozinski ja estis nun vera senrifugulo! Tial li sin direktis al la Parko. Se oni rigardus lin tiam de sur la placo, oni vidus lian blankan kostumon jen perdiĝi en la ombro de l' arboj, jen ree ekaperi en la lunbrilo.

Li marŝis tiel dum kelkaj minutoj. Subite li haltis. En la densejo antaŭ si li vidis grandegan kaĝon el maldikaj metalfadenoj, kvazaŭ kloŝo, kovrante la arbon. Sur branĉoj kaj transtrabetoj kviete sidis dormetantaj birdoj aspektantaj nun kiel grandaj grizaj buloj. Kiam Mateo aliris pli proksimen, granda vulturo levis la kapon, ekbriligis la okulojn kaj apatie levis la flugilojn. Poste ĝi sidiĝis kaj entiris la kapon inter la ŝultrojn.

Mateo iris flanken, timante ke la birdoj faros bruon. Li marŝis senbrue kaj rigardis ĉirkaŭen,

La alilandaj komercistoj, kiuj deziras uzi Esperanton, povos tion fari, havante la certecon esti komprenataj de siaj francaj korespondantoj, kiuj respondos al ili per la sama lingvo.

„Les Echos“ eĉ decidis organizi kurson de Esperanto por siaj abonantoj.

### Bona mieno, malgraŭ malbona situacio.

(Pri la Unua Idista Kongreso.)

En la n-o de 10. sept. de la franca semajna jurnalo „Le Progrès Civique“ (kiu parolis pri la kongreso de Praha en la n-o de 15. aŭg.) aperis jena noto de idista deveno pri la Wien'a kongreso:

„Malgraŭ la nombra supereco de la adeptoj de Esperanto, la idistoj ne rezignas propagandi sian formulon de lingvo internacia. De 6. ĝis 11. aŭg. ili havis en la komerca ĉambro de Wien sian unuan kongreson, kiu kunigis imponan nombron da aliĝintoj el 12 diversaj landoj. La diskutoj pri ĉiuj plej variaj temoj estis en ido. La Ministrejo de Publika Instruado de Holando, la „National Research Council“ de Usono, „L'Adult School“ de Anglujo estis reprezentataj. Rezultas el raportoj prezentitaj, ke ido havas adeptojn en 40 landoj. Ligo de Nacioj kaj de Internacia Laboroficejo.“

El ĉi tiu diplomata komunikado rezultas:

1. konfeso pri la progresoj de Esperanto,
2. rifuzo doni en ciferoj la „imponan“ nombron de kongresanoj,
3. negraveco de oficialaj reprezentantoj, ĉar la Ministrejo de Publika Instruado en Holando, la Ligo de Nacioj kaj la Laboroficejo havis delegitojn en la XIII-a. La prezidanto de la helplingva sekcio de „National Research Council“ s-o Cottrell, honora membro de UEA, ĉeestis la kongreson de Praha kaj parolis en Esperanto dum la bankedo de UEA.

Do, la „Sulsian Idisto“ tro frue ekvidis la ĉielrugon de ido.

Alo.

serĉante rifuĝejon. Baldaŭ li vidis antaŭ si blankan longforman konstruaĵon. La duono da ĝi troviĝis en mallumo, kaj Mateo supozis ĝin remizo, kie oni povas kunvolviĝinte dormi ĝis mateno. Sed alproksimiĝinte, li denove vidis feran kradon, antaŭ kiu li teruregite postensaltis. El post ĝi ekbrilis du fajraj okuloj. Granda griza lupo staris super dormanta lupino kaj sendeturniĝe sekvis ĉiujn movojn de la suspektinda viro blankevestita, kiu sen ia difinita celo vagadas nokte apud la bestejo.

Samtempe en la ombro homa voĉo diris ion angle per tono akra kaj kolera. Al Mateo tiu voĉo ŝajnis pli terura ol la murmurego de l' raba besto. Li ekteretis kaj timeme returneniris al la rando de la arbaro. Tie li haltis kaj minace svingis per la pugno. Al kiu? Li ne sciis, sed en la animo de la senlingvulo en tiu momento vekigis iaj lupaj sentoj

XXI.

Milda murmureto de akvo logis lin pluen. El nebone fermita krano de fontano fluetis en la basenon akvostrio. La flueto gutadis malrapide, kvazaŭ dorma; jen levigante, jen falante tute horizontale, ĝi sonoris kaj plaŭdiĝis.

Mateo sin klinis al la fontano kaj avide trinkis. Poste li demetis la ĉapon kaj faris signon de kruco, decidante kuŝiĝi tie en la arbetojo.

Pro la senbrueco de l' nokto de malproksime li aŭdis ekfajfon. Ĝi ŝajnis al li sono el alia mondo. Li mem antaŭ nelonge estis alveninta per vaporŝipo. Eble tio estas simila vaporŝipo el malnova Eŭropo, kaj ankaŭ sur ĉi tiu ŝipo alvenis homoj por serĉi en Ameriko sian feliĉon, kaj nun la alvenantoj rigardas la grandegan statuon kun levita brako, en kiu preskaŭ sub la nuboj lumas torĉo. Sed en la nuna momento al la Loziŝĉano ŝajnis, ke la torĉo lumigas faŭkon de grandega tombo

(Daŭrigota.)

# Sendependa Atesto pri la Praha Kongreso.

En la angla gazeto „Headway“ por septembro s-o Henry Vivian, pacjugo, konata liberalula pensanto kaj membro de la Agada Komitato de la Unuigo por la Ligo de Nacioj, skribas:

Sciante, ke mi projektis viziton al Ĉeĥoslovakio, la sekretario de la Unuigo por la Ligo de Nacioj petis min viziti la Esperantistan Kongreson en Praha. Mi ne estas kompetenta esprimi opinion pri la meritoj de Esperanto kiel lingvo, sed mi sentas, ke ia movado, kiu celas simpligi kaj faciligi internacian intertraktadon, postulas la simpatian kaj apogon de subtenanto de la Ligo de Nacioj.

Mi jam ĉeestis plurajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn dum la pasintaj tridek jaroj, kaj mi devas diri, ke la Esp. Kongreso eklipsis ilin tute, ne nur laŭ granda kaj entuziasmo, sed, plej grave, laŭ ĝia ebligado de komuna agado inter viroj kaj virinoj de diversaj nacioj kaj lingvoj. Ordinare okazas ĉe internaciaj kongresoj, ke la plimulto de la ĉeestantoj estas ege ĝenataj je la dua aŭ tria tago, pro la ĉiama malfacilaĵo de taŭga tradukado de la paroladoj. Karno kaj sango fine ribelas kaj serĉas rifuĝon per forflugo.

La kantado de la himno „La Espero“ de la granda ĉeestantaro estis per si mem inspirajo

D-ro Privat parolis per por mi stranga lingvo, sed tamen lia personeco estis tiel magna, kaj lia sintenado kaj gestoj harmoniis tiel rimarkinde kun liaj komunikoj, ke oni estis devigata senti simpatian kun li.

Sendube la tendenco de la movado estas en harmonio kun la Ligo de Nacioj, kaj ĝia kreskado ege faciligos la laboron de la Ligo.

W. M. P.

Esp. Grupo de Touring Club de France kune kun la cirkulero (vidu ET n-o 50) sendis al 1300 delegitoj de ĉi tiu turisma klubo lernolibron de Esperanto, raporton de la Pariza Komerca Cambro kaj alvokon de 21 akademianoj.

## Jarkunveno de Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo (REVELO) en Elberfeld (2. Okt. 1921).

La jarkunveno de Revelo, vizitita de ĉ. 80 gesamideanoj el Rejnlando kaj Vestfalia, staris sub la signo de granda ideala kaj reala sento, ĉar ĝi decidis per ĉiuj voĉoj, altigi la duonjaran kotizon por grupomembroj de 2 mk. al 5 mk., por izoluloj de 5 mk. al 7 mk. kaj por izoluloj en lokoj, kie ekzistas grupoj, 15 markoj. Oni opiniis, ke estas la deo de ĉiu vera esperantisto, kiu konscias, ke li estas pioniro de grava kulturmovado, ankaŭ subteni tiun movadon per ĉiuj fortoj kaj rimedoj. La grupo Köln estis reelektata kiel estrara grupo por la venonta jaro. Kiel lokon por la printempa kongreso de Revelo en 1922 oni elektis Hagen en Vestfalia. La grupo Koblenz invitis la kongreson de Revelo por 1923 al sia urbo. Adreso de Revelo: Köln, Hohestr. 26.

### R. V.

GEA (decido de la kongreso en Essen) kaj UEA (d-ro Privat en Prago) proponis la komisionon pri ellaboro de konceptajo de R. V., t. e. de ordita laŭ ideoj Oficiale Rekomendata (Parol-) Vortaro (v. ET 43) al s-o Eugen Wüster (Berlino). La akcepto de la invito dependas de la rezulto de la intertraktoj kun la gazetoj kaj la L. K. (Ak.). La funkcion de „korespondanto“ (lingvoteritoria centralizanto) konsentis preni sur sin: por Franc-lando s-o prof. Grosjean-Maupin kaj por Brit-lando s-o Edward A. Millidge. Oni jam ekrlatis kun eldonejoj.

## Esperanto en Pollando.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

BIELIZ (Teŝena Teritorio). Dank' al penado de ĉi-tiea gimnazi-direktoro s-o Bock, la pola instrumisterio en Varsovio permesis enkonduki Esperanton prove por unu jaro kiel fakultativan instruobjekton en Teŝena Teritorio.

BYDGOSZCZ. Starigo de Esperanto-oficejo ĉe Pola Esp. Servo, ul. Kordeckiego 1a. Malfarmata por publika uzado ĉiumerkrede kaj sabate de 6—8 vesp. Fremdaj s-anoj vizitantaj Bydgoszcz-on turnu sin por informoj kaj konsiloj ĉiuhore rekte al P. E. S. Esp. kunvenoj okazas ĉiumarde je 6.30 en la ejoj de Pola Esp. Servo, afable disponitaj de la gvidanto de l' Aŭtodidakta Unjversitato s-o Chmielewski. — „Vivanta Ĵurnalo“ de Pola Esp. Servo, red. E. Fethke. Jen novaĵoj! Anstataŭ presi gazeton, la diversaj kunlaborantoj buŝe parolas, prelegas aŭ deklamas siajn ellaborajojn dum esp. kunvenoj. La elpensinto de tia ĵurnalo s-o Fethke bonege redaktas la ĵurnalon. — Ĉe la ĉi-tiea germana popolaliternejo okazas prelegoj priesperantaj faritaj de s-ano Dankratz.

LESZNO. S-ano Monarzynski gvidas kurson kun 8 seminarianoj.

KARLO (ridante). Ho, kia naivulo vi estas! Ĉu vi ne povis diveni? En la malnova Esperanto tio estas „mia kara amiko“.

TEODORO. Kial do vi tiel strange ŝanĝis tiujn ĉi ordinarajn vortojn?

KARLO. Vi miras kaj ne komprenas? Sed mi tiamaniere ŝanĝis pli ol duonon da vortaro! Tuj mi klarigos al vi, kial mi tion faris. Ni komencu per la nekomprenitaj de vi vortoj. Vidu: pronomoj personaj en Esperanto, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj, anstataŭas substantivojn, kaj sekve ili devas finiĝi ankaŭ per „o“ (analogie kun la numeraloj ordaj, pronomoj posedaj kaj participoj, kiuj finiĝas per „a“, ĉar ili anstataŭas adjektivojn), des pli, ke „i“ estas finiĝo de infinitivo. Krom tio, se mi konservus por ĉi-tiuj pronomoj la finiĝon „i“, rimarku kiel multe da vortoj en la malnova vortaro estus sovaĝaj, — ekzemple: mi-lito („mi estas lito“!), mi-opa („op“ estas ja kolektiva sufikso de numeraloj), ci-tro, ci-trono, li-ano, li-belo, li-bera, si-ringo si-lento, si-mila ktp. ktp. Ĉu ne vere, kiaj sensencaj vortoj! Sed se ni por pronomoj prenos la finiĝon „o“, tiuj-ĉi sensencaĵoj malaperos. Pro tio laŭ mia gramatiko la pronomoj personaj estas: mo, co, lo, so, go, no, vo, ilo, ono, — kaj tial tute logike ĉiuj posedaj pronomoj devas esti: moa, coa, loa, soa, goa ktp. (mi ne volas uzi „ŝoa, ĝoa“ ktp., ĉar mi forigas ĉiujn supersignitajn literojn, same kiel mi tute neniligas malsaĝan artikolon „la“).

Nun pri „kira“. Tiun ĉi vorton mi uzas anstataŭ malnova „kara“. Kial? — Por eviti mal-kompreniĝon: „kara“ ja estas unu el koloroj de ludkartoj, same kiel „kera“; „kora“ mi ne povas uzi, ĉar ĝi havas alian signifon; „kura“ devenos de verbo „kuri“. Tiamaniere, kiel vi vidas, mi elprovis ĉiujn vokalojn kaj konvinkigis, ke nur la vorto „kira“ nenion signifas . . . pardonu, mi volis diri, ke nur la vorto „kira“ en tiu ĉi okazo estas bona.

TEODORO (ironie). Mirinda spriteco!

KARLO (ne atentante Teodoron). „Amiko“ . . . „am-iko“ . . . absolute sensenca vorto, ĉar unue „iko“ nenion signifas (kvankam mi anstataŭas per la sufikso „ik“ malnovan „id“), kaj due — malnova esperanta „amiko“ laŭ sia senco signifas

LODZ. Konata s-ano pastro mariavita s-o Furmanik vizitis la urbon. Je lia honoro oni aranĝis belan saluffeston. — La 27. 8. okazis en esp. kunveno parolado de s-ano Applebaum el Britlando. — S-ano Lejzerowicz eldonas duonmonatan ĵurnalan gazeton, hektografitan kun la nomo „Junula Voĉo“.

LOMZA. S-ano prof. J. Kronenberg gvidas kurson inter skoltaro.

MIEDZYRZECZ. S-o N. Brukarz elektita kiel del. de UEA; li klopodos aranĝi publikan priesp. paroladon.

SIEDLCE. Esp. kunvenoj ĉiujade. — Novan esp. kurson gvidas s-ano Cz. Pruski. — La 6. 8. speciala kunveno de „La Radio“ por gastigi traveturantan s-anon Poniatowski el Lukow. La 1. 9. vizitis la urbon nordamerika s-ano Zysk.

WARSZAWA. „Robotnik“, centra organo de la partio socialista en Polio presigis longan artikolon de red. Kwietniowski, en kiu li mallaŭdas la polan registaron, ke ĝi ne sendis oficialan delegiton al Praha.

WLODAWA. Propagandas la ĉi tiea sola esperantisto s-ano A. Czermak.

NYDEK (Ĉeĥo-Slovakio). S-ano Prengel esperantigis la ĉi-tiean redaktoron de pollingva revuo „Teozofja“ s-ano Kalfos, kiu promesis disponigi en ĉiu numero de la revuo ĉirkaŭ 4—6 paĝojn sole por Esperanto.

TRZYNIEC (Ĉeĥo-Slovakio). S-ano L. Kronenberg parolis antaŭ 200 personoj invitata per la estraro de la pola socialista grupo por Ĉeĥo-Slovakio. La parolado sukcesis bonege. Oni invitis s-anon Kronenberg gvidi kurson en Trzyniec, Karwina, Morawska Ostrawa kaj aliaj urboj.

Prengel, gvid. de P. E. S.

### El Varsovio.

La 25-an de septembro okazis unua postferia kunveno de Pola Esp. Soc. Ĉeestis honora membro s-ino Klara Zamenhof kaj gasto el Parizo s-ino Cense. Redaktoro Leo Belmont parolis brillumore pri Praha Kongreso. Oni decidis aranĝi ankaŭ dum okazonta konferenco de delegitoj de provincaj societoj (1. kaj 2. nov. en Varsovio) grandan funebran vesperon por memoro de A. Grabowski.

## Komerco.

Grava komerca ĵurnalo por Esperanto.

Sur la 1-a paĝo de nia hodiaŭa n-o ni raportas, ke konata franca komerca revuo tre favoras Esperanton. Ne malpli favora estas la oficiala organo de la Internacia Foiro de Frankfurt („Frankfurter Wertszeitung“), kiu en sia dua speciala numero de 24. sept. enhavas bonegan artikolon de s-o Kreuz: „Esperanto por la komerco!“ La aŭtoro parolas pri la kongreso de Praha kaj speciale pri la komercista konferenco. Li donas la tekston de tie akceptita rezolucio (laŭdo al la Foiro de Frankfurt pro ĝia praktika utiligo de Esperanto) en esperanta kaj germana lingvoj, kaj la aŭtografajn (subskribaĵojn) de s-oj Fujisaŭa, Kreuz, Cuzon, Tell, Gili Norta kaj Unger.

## Tipoj de Esperantistoj.

### Reformisto.

„Moa kira amfrato! Dum moa triluna studado de Esperanto mo konvinkiris, kve etlu lango ne estas tom perfekta, kom pri tio krias noaj tro entuziasmaj samideanoj, kvankam en go estas multaj bonaj flankoj. Al mo tamen sajnas, kve no povas akcepti Esperanton, kom langon internacian, sed no devas fari en go gravajn korektojn kaj plibonigojn, post kiuj go sendube farizos multe pli perfekta ol nun.“

Mo jam komencis etiu laboron kaj post unu — du lunoj mo esperas gon publikigi. Se vo interesizas pri etiu demando, volu mon viziti iam vespere post kvina horo, kaj mo konatigos von kun tio, kion mo faris kaj estos faronta. Saluton!  
Voa Karlo.“

Tian leteron sendis 20-jara junulo Karlo N. al sia kamarado kaj samaĝulo Teodoro K., kune kun kiu li estis lernanta Esperanton. La letero, kiel vidas elegantoj, estis skribita jam en „reformita kaj korektita Esperanto“, kaj Teodoro K. duan tagon vespere alkuris al sia genia kamarado.

Nun do imagu, ke ni nevidate ĉeestas la sciencan interparolon de l' amikoj.

KARLO. Bonan tagon, mia kara, mi estas tre ĝoja vin vidi.

TEODORO. Bonan tagon! (Sidigis) Vidu, kiel rapide mi venis laŭ via invito.

KARLO. Dankon! Kaj mi kredas, ke vi ne ĉagreniĝos pri via rapideco, ĉar mi konatigos vin kun miaj gramatikaj laboroj.

TEODORO. Estas tre interese. Mi vidas el via letero, ke vi jam komencis praktikan enkondukon de viaj reformoj. Sed mi devas konfesi, ke multajn vortojn en via letero mi tute ne komprenas.

KARLO (kontente ridante). Nu, tute nature: vi ja alkutimiĝis al malnova Esperanto. Kiajn — do vortojn vi ne komprenas?

TEODORO (elpoŝigas la leteron). Tre multajn . . . Jen, ekzemple, en la komenco mem vi skribas: „moa kira amfrato“ Kio ĝi estas?

„frato de amo“ kaj sekve ĝi devas esti en Esperanto „amfrato“.

TEODORO. Sed ĉu ĝi ne povas signifi „amo de frato“?

KARLO. Tute ne: amo de frato estas „frat-amo“ . . . Sed tio ĉi estas ankoraŭ bagateloj. Vi trarigardu atente la vortaron de malnova Esperanto kaj tiel nomatan „genian sistemon de afiksoj“, — Dio mia, kiaj idiotajoj tie troviĝas! Jen kelkaj ekzemploj: fonto kaj fontano (ano de fonto), kalko kaj kalkano (ano de kalko?!). Kaj kion signifas kalkulo? Persono kun kalka kvalito?! Katara — aro da katoj? Poste: ripo - ripeto (malgranda ripo) kaj riparo — kolekto da ripoj? Maniero, kulero, kolero, vetero ktp., kio ili estas? Partoj de manio, de kulo, de kolo, de veto? Analizu ankaŭ la rimarkindan vorton „veterinaro“: „vet-er-in-ar-o“

Kia sensencaĵo! . . . Ok-ulo?! regulo?! . . . „Kuk-urbo“ estas ja ordinara legomo, kaj en malnova Esperanto ĝi estas „kuka urbo“!

TEODORO. Sed, mia kara . . . moa kira en ĉiuj lingvoj estas similaj strangajoj.

KARLO (kolere). Jes, en ĉiuj naciaj lingvoj, — sed Esperanto estas lingvo internacia, kaj ĝi ne povas esti simila al aliaj lingvoj!

TEODORO. Kion do fari?

KARLO. La reformojn: ŝanĝojn, plibonigojn, perfektigojn! . . . Trovu, ekzemple en la fundamenta gramatiko de Zamenhof klarigojn pri parenceco. Vi ne trovas ilin, ĉar ili tute forestas. Kaj jen rigardu en mia reformeta gramatiko. (Karlo prenas grandegan kajeron, foliumas ĝin kaj aŭtoritate diras:) Jen kiel mi klarigas, ekzemple, la diferencon inter mi, mia patro kaj mia avo, — aŭskultu (li laŭte kaj malrapide legas): „patro de moa patro ne estas moa patro, kaj prapatro de moa patro ne estas patro de moa patro, sed moa prapatro estas patro de moa patro“. Vidu, kiel ĉio estas simpla, klara kaj logika! . . .

TEODORO (kolere leviĝas kaj prenas la ĉapelon). Jes, mirinda logiko! Nekredeble mirinda! . . . Sed ĉu vi scias, kia estas diferenco inter vi kaj azeno?

KARLO. (tute konfuzite, kun miro). Mi ne scias!

TEODORO. Nu, mi ankaŭ ne scias! . . . Adiaŭ! (Li rapide foriras). — V. Devjatnin.

**Komerca ĉambro de Treport**  
franca marhaveno kaj marbanloko en la departemento Seine Inférieure kun 5000 loĝantoj, sciigis per letero de 24. sept. al s-o Demarcy, prez. de la esp. grupo en Beauvais, pri sia subteno al Esperanto.

## Tekniko.

**Kunigo de ordinara kaj senfadena telefono.**

Ĉe la sveda ŝtata telegrafejo oni faris dum la lasta tempo eksperimentojn kun nova eltrovaĵo tre grava. Ni scias, ke ekzistas kaj telefono kun fadeno, kaj telefono sen fadeno. Nun oni konstruis aparaton por kunigi la ordinaran telefonon kun la senfadena.

Tio havos grandan signifon. Vojaĝantoj povos per la telefono de ŝipoj paroli kun personoj en la hejmo, la komercisto kun siaj dungitoj, la ŝipestro kun la pilotoj aŭ kun aliaj ŝipestroj ktp.

La nova eltrovaĵo ne estas tute preta por uzo, sed post mallonga tempo la unuaj aparatoj estos fabrikataj.

Kiam fremda ŝipo venos al haveno, oni povos telefoni tien; sed tiam povus okazi, ke ili ne komprenus unu la alian pro neperfekta elparolo de la lingvo uzota, ekz. se oni uzos la anglan, francan aŭ alian lingvon. Nia Esperanto ankau tie ricevos gravan signifon, ĉar per ĝi oni povus pli facile komprenigi sin. *Henning Halldor.*

## Studentaro.

**Raporto pri la Faka Kunveno de la Studentoj en Praha.\*)**

La faka kunveno okazis marde posttagmeze; ĉeestis 40 studentoj.

Elektaj: prez. F. Schneider, Praha; sekr. Rado Bela.

Kolegoj Walter Unruh, Germanio, kaj Atanasoff, Bulgario, parolis pri la esp. propagando inter studentoj.

Laŭ propono de kol. Unruh oni akceptis unuvoĉe la sekvantan rezolucion al la „Confédération Internationale des Etudiants“, kiu estos transdonata al la nomita asocio de la ĉeĉstinta kolego Victor Hendrix, Gent:

„La Studenta Faka Kunveno de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto akceptis unuvoĉe la sekvantan rezolucion: La esperantista studentaro proponas al la C. I. E. akcepton de Esperanto por ĝiaj kunvenoj kaj por ĝia estonta oficiala gazeto. La studentaro almenaŭ atendas, ke la C. I. E. ĉiamaniere helpos la internacian esperantan aferon, kiu multparte havas la samajn celojn. La studentaro atendas, ke la C. I. E. akceptos kiel eble plej baldaŭ ĉiujn studentajn asociojn, por ke la internaciaj celoj des pli multe estu helpataj.“

Laŭ propono de kolego Grenkamp oni elektis provizoran komitaton, kiu faros la preparajn laborojn por la fondiĝo de Studenta Ligo Esperantista, kiu estos fondata dum la XIV-a en Helsinko.

\*) Ni petas insiste, sendi raportojn tuj kaj ne nur post 2-5 semajnoj aŭ 2-3 monatoj. Per tia prokrasto ne sole la raportoj fariĝas neaktualaj, ankau la celo intencita per ili ofte ne estas atingata.

### Alvoko al la esperantista studentaro!

Dum la XIII-a en Praha fondiĝis prep. komitato por la Studenta Ligo Esperantista. Celo: Unuigo de la esperantistaj studentoj, akceli rilatojn inter la diversnaciaj studentoj-esperantistoj, propagando de Esperanto inter la studentaro. Aneco: Anigaj povas ĉiu studento (lernanto) almenaŭ 14-jara kaj ĉiu studenta asocio. Kotizaĵo ne estas ankoraŭ fiksita. Libervolaj pagoj por niaj poŝtelspezoj estos danke akceptataj kaj kvitataj en la elektota oficiala gazeto. Kiu volas anigi, skribu al la landa delegito aŭ al la sekretario: Franz Schneider, Praha-Karlín, Havlíčkova 17.

### Delegitoj por landoj:

Aŭstra: F. Redl, Wien XIX, Obkirchgasse 41. — Belgia: Victor Hendrix, Gent, Zalmstraat 43. — Bulgara: Ivan Zlatanov, Bela Slatina. — Ĉeĥoslovaka: F-ino Āndela Kozakova, Praha II, Lipova 6. — Dana: Knud Thorbjörn, Hansen, Ostervraa, Vendsyssel. — Estona: Jaar Laarmann, Tartu, Liidat. 30-11. — Finna: F-ino Helene Wahlpurst, Helsinki, Laivurik. — Germana: F-ino Maria Jung, Köln, Am Zuckerberg 8. — Itala: Elio Migliorini, Roma, Piazza Scanderbeg 85. — Pola: Salo Grenkamp-Kornfeld, Jaslo. — Rumana: Gyulai Kalman, Targul-Mureș, Str. Argalucieau 5. — Svisa: F-ino Helene Alschwang, Lausanne, Rue de l'Aurore 22. — Ukraina: Michal Stefankiv, Praha I, Masna 1000.

## Gazetaro.

### Francaj Gazetoj.

Le Petit Journal, Paris, 25. 9. (malfavora artikolo „La rolo de la franca lingvo en la mondo“).

L' Ere Nouvelle, Paris, 26. 9. (granda artikolo de s-o Millardet „Esperanto devas esti la dua lingvo en ĉiu lando“).

L' Alliance Démocratique, Beauvais, 29. 9.

L' Index des Industries du Cuir, Paris, sept.

### Allandaj Gazetoj.

Luthersk Kirkeidende, Kristiania, Norv., 27. aŭg. (Traduko el ET.)

Frankfurter Messzeitung, Frankfurt, Germ., 24. 9. (Vidu sub „Komerco“).

Teozofja. (Vidu sub „Esp. en Pollando“).

## La mirinda lumo.

Inter tero kaj ĉielo  
Pendis kvazaŭ brila floro  
Buklo de falinta stelo  
Ĉirkaŭ noktomeza horo.

Plena de mirindaj sentoj  
Suĉis mia kor' aeron,  
Kaj senlimaj elementoj  
Tuŝis la malgrandan teron.

Tremis lumo adorata,  
Timis lumo homan vidon;  
Ĝi kurbigis spirblovata,  
Sentis teran ĝi avidon.

Ho, ne kovru vin per nuboj,  
Ne paliĝu, luma brilo!  
Vin ne trafos krudaj buboj,  
Eĉ se vin atakus milo.

Mi vin ŝirmos, mi vin savos,  
Kisos brilan veston ĉastan,  
Mi ne plu ripozon havos,  
Donos sangoguton lastan! —

Alten flugis la paroloj,  
Larmoj en okuloj tremis,  
Miaj blankaj maleoloj  
En la sablon signojn premis.

Super mi la nokto zumis,  
Mia kor' leviĝis plore,  
Kie ora buklo lumis  
Klare, brile, dolĉ-odore.

Mi ĝin sekvis kun sopiro,  
Ĝi ne haltis en etero:  
Homa voko, homa spiro, —  
Ĝin forglutis la aero.

Ĉu mi pensas ĝin kaj revas,  
Manojn al ĉiel' etendas:  
La vualon ĝi ne levas,  
Ne plu lumon al mi sendas...

*N. Barthelmess.*

## Jubileo

**de Canko Bakalov Cerkovski  
„la kampa kantisto“ de Bulgario.**

La 16. oktobro estos festata en tuta Bulgario la tridek-jara jubileo de la agado de l' bulgara poeto Canko Cerkovski, fondinto de la Bulgara Popola Agrara Ligo, nuna ministro de l' societaj konstruaĵoj, vojoj kaj bonorganizoj. Tiucele estas farita alvoko al la bulgara popolo, por ke ĝi montru al li la necesan atenton, amon kaj dankon samkiel ĉe la jubileo de l' nacia poeto Iv. Vazov, ankau pretecon subteni la poeton materiale. Laŭ la voĉdono de la parlamento estos donacata al la poeto sumo de 80 000 levoj kaj estos liberigataj liaj bienoj de ĉiuj ajn impostoj. Estos formata fondo „Canko Cerkovski“ por helpo al malriĉaj verkistoj kaj eldono de iliaj verkoj. Krom tio la komunumo de Bjala-Cerkova (Tirnova distrikto) naskvilaĝo de l' poeto, decidis, en la tago de l' jubilea soleno donaci al li la reaĉetitajn de ĝi bienojn de 10 dekara grundo kaj la domon, en kiu naskiĝis kaj verkis la poeto. La lasta estos transformata je muzeo. Lia busto el bronzo kaj en natura grandeco estos metata en la parko de la legejo en la dirita vilaĝo, kiu estas unu el la plej pitoreskaj kaj progresintaj. Jubilea kolekto de artikoloj pri la poeto estas ŝtate eldonita.

El ĉiuj bulgaraj verkistoj nur Cerkovski sukcesis penetri en la animon de la vilaĝano kaj eliri el tie la eternajn perlojn de bono kaj belo por riĉigi la junan bulgaran literaturon. Cerkovski unua vidis en la vilaĝano luktanton por la homa vivo, por la homaj rajtoj. Lia vilaĝano trenas mizeran kaj zorgan ekziston, sed estas simpatia kaj kapabla ekzisti kiel individuo kun sia propra celo. Samtempe poeto kaj politikisto, li alvokas la popolon al lukto kontraŭ la mondaj maljustaĵoj. Lia kolekto „Kampaj Kantoj“ estas la vera enkorpiĝo de la tiel variaj manifestoj de l' animo de la bulgara vilaĝano. La amo estas kantata

en la „Lirikaj Versaĵoj“, kiu povas esti metataj samstape kun la amkantoj de Heine. Multaj el liaj poeziaĵoj meritas esti konataj ankau ekster Bulgario. Cerkovski traktas la samajn aferojn en siaj rakontoj kaj dramoj. *Iv. Krestanoff.*

Se eble, ni publikigos en iu venonta numero rakonton de la „kampa kantisto“ de Bulgario.

## Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pluaj donacoj de:

|                                   |                      |
|-----------------------------------|----------------------|
| 14. J. Grünthal, Haapsalu, Est.   | 20 gmk.              |
| 15. Leono Funken, Koblenz, Germ.  | 5 gmk.               |
| 16. G. van Heek, Hengelo, Nederl. | 110 gmk.             |
|                                   | Entute 135 gmk.      |
|                                   | Antaŭa sumo 402 gmk. |
|                                   | Tuta sumo 537 gmk.   |

## Parolejo.

101. Monumento al D-ro Zamenhof.

En la rezolucio pri la monumento al d-ro Zamenhof mi juĝas ne konvenaj kaj ne gustaj la vortoj „sur la tombo“. Mi persone konas bone la lokon, kie troviĝas la tombo de nia majstro, ĉar mi partoprenis en la enterigo. Tiu ĉi lokon por monumento mi ne trovas bona. La gloro kaj meritoj kaj eĉ internacia honoro ne permeas, ke la monumento por nia majstro, konstruota de moneroj de ĉiulandaj esperantistoj, troviĝu en loko malmulte konata, ĝenerale de neniu vizitata krom de hebreoj kaj troviĝanta en la fino kaj neinteresa angulo de la urbo Varsovio.

La magistrato de Varsovio havas moralan devon por dediĉi al la memoro de nia majstro konvenan placon, honoran lokon, kie la impona monumento estus facile pririgardata de ĉiuj kaj speciale de tiuj esperantistoj fremdlandaj, kiuj venos al Varsovio.

Varsovio sendube plenumos sian devon kaj volonte oferos lokon kaj helpon en tiu rilato.

(D-ro Jan Medrkiewicz  
en Slawinek p. Lublin.)

## Recenzejo.

(Unuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝanĝe kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

### LIBROJ.

EL LA HUNGARA LITERATURO. Bonhumoraj rakontoj de nuntempaj verkistoj. Tradukis: Balkanyi, Fajudl, Tikovszky, Haurzovic kaj Kepes. 51-pg. 11:15 cm. Budapest 1921. „Per Esperanto al la Tutmondo“. Prezo: broŝ. 0,25 sv. fk., 2,20 germ. mk.

Bonhumoro kaj ĝojo, Didonacoj, ni malhavas vin en la nuna tempo! Tiujn vortojn mi legis antaŭ kelkaj tagoj en gazeto. La skribinto estas prava; maloftaĵo fariĝis la ridado. Pro tio ni salutas la aperon de la bonhumora rakontaro el la hungara literaturo. La sep rakontoj estas ne malbone tradukitaj. Esp. Lit. Asocio rekomendis la spritplena libron. Mi trovis kelkajn preserarojn kaj „hungarismojn“. (G. Ajul.)

ESPERANTISMAJ VERSAĴOJ. Popola Biblioteko Esperantista, n-o 2. 16 pg. 11 1/2 : 14 1/2 cm. Eldonejo: Ella Rothermel, Gr. Tabarz, Thür., Germ. Prezo: broŝ. 1,60 mk. por Germ. kaj 2,50 mk. por eksterlando.

La libro enhavas originalajn versaĵojn de d-ro Zamenhof, Grabowski, Kuhl, Deŝkin ktp.; inter aliaj: Preĝo sub la verda standardo, La vojo, Ho mia kor', Al' la fratol, kaj La tagiĝo. La volumeto estas bela buketo de versaĵoj kaj poeziaĵoj, kiuj ĉiuj bazas sur la interna ideo de la Esperantismo. (G. Ajul.)

ESPERANTO-KRESTOMATIO. Unua parto — unua legolibro. De instruisto Taubmann, redaktoro de „La Marto“. Unua eldono. 80 pg. 11 1/2 : 16 cm. Eldonejo „La Marto“, Haida, Bohemujo. 1921. Prezo: kartonite 6 kc.

La Esperanto-Krestomatia de s-o Taubmann estas unu el la plej bonaj esp. legolibroj verkita laŭ praktika vidpunkto, kiujn mi vidis ĝis nun. Mi sincere gratulas la aŭtoron pro lia valora laboro. La ekzerco povas servi kiel simpla legolibro dum aŭ post la kursoj aŭ kiel lernolibro laŭ la natura parolsistemo.

Ĝia enhavo estas eksterordinare riĉa. Pritraktante laŭsisteme la tutan gramatikon per interesaj, allogaj temoj, la verkinto majstre uzas ĉiujn gramatikajn formojn kaj aplikas grandan vortrezoron ne trudante al la lernanto la lernadon de amasego da vortoj.

La aldono enhavas kolekton de komercaj leteroj. La lastan paĝon de la libro la aŭtoro dediĉis al nia mortinta majstro. Li nur erare skribis, ke d-ro Zamenhof mortis en Kopenhago.

Preserarojn mi ne trovis, sed kelkajn malĝustaĵojn kaj esprimojn al mi ne plaĉantajn, ekz. karavano firiĝas tra la dezerto, longjara (multjara, ĉar mallongaj jaroj ne ekzistas), li prepariĝis mariston, timus (timigis) ktp. La nekorektaĵoj estas facile forigeblaj en dua eldono, kiu sendube baldaŭ aperos, ĉar la malgranda provizo de la unua eldono (du mil libroj) de la bonega krestomatia estos rapide elĉerpita. Pruvo de ĝia boneco estas la fakto, ke la Esp. Lit. As. rekomendis la libron. (G. Ajul.)

## Monteys & Martinez, Barcelona (Hisp.)

Comercio 31-3-2.

Ni aĉetas je nia propra kalkulo kaj komisio germanajn kaj aŭstrajn komercaĵojn.  
Estas preferindaj la jenaj artikloj:

Malplenaĵ  
kverkbareloj. :: Kverk-  
lignaĵoj. :: Diamantoj kaj brillantoj.  
Oraĵoj. :: Artikloj por aŭtomobiloj. :: Materialoj por  
aŭtomobil-kaleŝoj. :: Horloĝoj. Ledoj, silkaĵ  
ŝtrumpoj kaj ŝtrumpetoj por sinjorinoj  
kaj sinjoroj. :: Tolajoj kaj  
teksaĵoj. :: Vitraro  
kaj tiel plu.



JAN AMOS KOMENSKY (Johano Amos Comenius). Boheme verkis prof. d-ro Jan Novak. Tradukis „Rondeto de Esperantistinoj“ en Praha. 27 pĝ. 10 : 16 1/2 cm. 1921. Eldonis „Rondeto de Esperantistinoj“ en Praha-Smichov, Jungmanova 6. Prezo: 5 kĉ. (afrankite 5,40 kĉ).

Estas fakto, ke nur malmultaj homoj, t. e. neĉeĥaj personoj, scias ion pri la vivo kaj la laboroj de la granda ĉeĥa korifeo Comenius. Nur la nomo konas la plej multaj. Ni tial salutis la aperon de la broŝuro pritraktanta la vivon kaj la verkojn de tiu eminentulo, al kiu Eŭropo ŝuldas grandan dankon.

Ni ne povas ĉi tie doni longan raporton pri la enhavo de la libreto, kies antaŭparolon verkis d-ro Kamaryt el Bratislava. Ĉiu historiisto ĉerpos valorojn el ĝi. Laŭ lingva vidpunkto ĝi estas bone skribita. Mi trovis: (Holando (anst. Holando), apercipo (?) k. a. (G. Ajul.)

## GAZETOJ.

**ESPERANTO-PRAKTIKO.** Aŭg.-sept.

Raporto: Berlin-Dresden-Praha, kun postparolo al la Loka Kongresa Komitato pri maltaŭga organizo en Praha.

**ESPERANTA FINNLANDO.** Aŭg.-sept.

Kun riĉe ilustrita raporto „Bildoj el la 15-a Universala Kongreso de Esperanto“.

**LA ESPERO.** Sept.-okt.

Raporto pri „La karavana vojaĝo al Praha“ k. a.

**NOVA TEMPO.** Aŭg.-sept.

Artikoloj pri „La kultura signifo de internaciismo“, la XIII-a, Dante ktp.

**ESPERANTA LIGILO.** Sept.

**HUNGARA ESPERANTISTO.** Sept.-okt.

Kun raportoj pri la XIII-a kaj pri la Postkongreso en Budapeŝt. Belaj „kantoj“ de Julio Baghy. Du ilustraĵoj.

**OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA.** 25. sept. 1921.

Enhavas la oficialajn decidojn kaj komunikojn de la Lingva Komitato: Raporto al la Dektria Kongreso de la Prezidanto de la L. K. kaj Akademio. Krom tio raporto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. — Adreso de la redakcio: 81, rue de Cligny, Paris.

**VERDA UTOPIO.** Jul.-aŭg.

Interalie portreto kaj kortuŝa artikolo pri rusa blinda esperantisto Vaasilij Eroŝenko, socialista verkisto kaj bonfarinto, elpelita el japana teritorio kiel supozita bolŝeviko.

## Anoncetoj.

**EDZIĜO.** Ernst Muthschall — Elisabeth Muthschall nask. Jeschke. — Cottbus, Forst (Germ.), la 26-an de septembro 1921.

**MORTO.** Mortis nia abonanto, ŝatata esperantisto s-o John Wilson en Hillesdon. Leek, Britl., la 25-an de aŭgusto.

**BILBAO, TONDILO.** Mi petas la germanan samideanon, de kiu mi ricevis tondilon por doni ĝin al lia korespondanto, scilgi al mi ties adreson. José Santamaria, ĉe firma Ricardo Agüero, Alameda de Urquijo 27, Bilbao, Hisp.

**ET N-o 21.** N-o 21 de „Esp. Triumfonta“ estos acetata de Tauno Hakanen, Fredrikinkatu 45, A. lok. 6, Helsinki, Finnlando-Suomi. Kiom vi volas?

**AMO PER PROVERBOJ.** Unuakta komedio de Arthur Azevedo. El la portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes. Eldonejo Oskar Ziegler & K-jo, Markt-Redwitz (Germ.). Prezo 5 resp.-kuponoj. Acetebia ĉe la tradukinto: Laranjeiras, 225, Rio de Janeiro, Brazilio. — Komedieto tre taŭga por la prezentado.

**PROPAGANDILOJN** ĉiusepacajn bonvolu sendi por granda propaganda ekspozicio okazonta dum la 11-a Germana Esp. kongreso 1922 en Breslau al Georg Habellok, Breslau 10 (Germ.), Schiemacherstr. 19. Mi kompensos ĉiun sendaĵojn per il. poŝtk. de Breslau.

**RUSAJ SAMIDEANOJ!** Multaj hungaraj samideanoj ricevis de vi diversajn sendaĵojn, leterojn kaj poŝtkartojn kun la peto je respondo. Sed el Hungario estas neeble sendi ion al Ruslando; do pardonu, se vi NE ricevis respondon. Ni kore dankas pro la senditaj leteroj kaj esperantaĵoj. Espereble ni povos iam rekomenci ilin. (Ensendita de Hung. Esp. Servo.)

**ESPERANTO-OFICEJO,** Bremen, Kirchweg 61/1., Germanio, peras kaj prizorgas ĉiusepacajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp. Specialaĵoj: socialista kaj aliaj literaturaj, poŝtkartoj, stampiloj, fotografiloj, poŝtmarkoj. Horloĝoj — novargentaĵoj — teknikaj objektoj (precipe tranĉiloj, forkoj, kuleroj ktp.). H. EHLERS.

**DANTE-EKSPOZICIO** okazos en la Nacia Muzeo de Budapeŝt. Kiu povas pruntedoni esperantan tradukon el Divina Komedio, sendu ĝin tuj al Paul Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos-utca 15-II-2.

**FILATELISTOJ.** Ĝus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 80 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmarkaj kompletoj de diversspecaj polaj pm.; same ukrainaj, Petlura, rusaj jubileaj Romanoff, generalo Judenitŝ kontraŭbatalanto de bolŝeviko, rusaj sovjetaj kaj diversaj poŝtmarkoj de Litva Srodkowa de generalo Zeligovski. Liverado al seriozaj kolektantoj. La pago per respondkuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj naciaj poŝtmarkoj. Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

**DEMANDO.** Kiu donis en Praha ion al bulgara esperantisto por ĝin alporti al mi, sciu, ke mi nenion ricevis kaj ke li devos repostuli ĝin. Ivan Krestanoff en Pirdop, Bulgario.

**ESP. LEGAJO** bonstila kaj interesa: „La Bulgara Lando kaj Popolo“, 4 sv. fk. aŭ 20 germ. mk., kaj „El la proklama Oriento“, 2,50 sv. fk. aŭ 15 germ. mk. Ambaŭ kun trikoloraj etnogr. kartoj kaj presitaj en Bern. Tiuj literatur-sciencaj verkoj donas plenan bildon pri Bulgario kaj Rusio kaj estas laŭdataj de mil samideanoj. Haveblaj ĉe la aŭtoro: Iv. Krestanoff, Pirdop, Bulgario.

## Korespondo kaj Interŝanĝo.

**S-o M. Ohtani,** 105, Kobai-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japan., deziras korespondi kun lingvaj geinstruistoj aŭ gelnantoj kaj komercistoj, per leteroj aŭ ilustr. poŝtkartoj. Kolektas geografiajn kartojn kaj interŝanĝas gazetojn aŭ librojn en Esperanto aŭ nacilingvo. Ankaŭ ŝatas versaĵojn.

**Gelnantoj** de la esp. kurso ĉe Osaka Siminkan (Urba Domo) deziras korespondi kun gelnantoj tutmondaj. Precipe bonakceptas leterojn aŭ poŝtkartojn ilustr. de ekstrema malproklamaj landoj. Rusoj, hispanoj, hindoj k. a. sendu al adreso: Esperanto-kurso, ĉe s-o M. Ohtani, 105, Kobai-ĉo, Kita-ku, Osaka, Japanujo.

**Sergeo Sentakov,** Petrograd, Rusio, V. O. 14-a linio, 51. I. 17, 18-jara junulo, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr.

**F-jo Teodoro Forteza,** Calle Escursach n-o 1, Palma de Mallorca, Hisp., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., leterojn kaj poŝtkartojn kun la tuta mondo. Kun fraŭlinoj korespondos pri ĉarmaj aferoj.

**Otto Breuer,** Grottau 165, Ĉeĥoslovakio, korespondas kaj interŝanĝas per poŝtkartoj ilustr., poŝtmarkoj kaj esp. gazetoj, kun ĉiuj landoj.

**Fritz Pletsch,** Grottau, „Ankerbank“, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun la tuta mondo.

Internacia Eksped- kaj Transport-Oficejo  
ALEKSANDER ROZANYKWIAT & K-jo, VARSOVIO, DLUGA 23.

## KOMERCAJ-EKSPEDADO

al ĉiuj urboj de Polujo, Litovujo, Germanujo, Aŭstrio, Francujo, Rumanio, Usono kaj „vice-versa“.

Dogano, enkasigo, asekurado de ŝarĝaĵoj kontraŭ tuta aŭ parta ŝtelo.

Propraj tenejoj korespondantaj en 42 urboj.

Oni korespondas en ĉefaj eŭropaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Oni serĉas rilatojn kun seriozaj eksterlandaj eksped- kaj transport-firmoj.

## Peresperanta propaganda parolado!

Per Esperanto tra 17 landoj.

Sep jaroj en Argentino.

Por orienti intersemulojn:

ĉirkaŭ 120 lumbildoj pri jenaj temoj:

Vojaĝoj. — UEA-servoj. — Esperantujo. — Buenos Aires. — Argentinaj pejzaĝoj. — Popola vivo. — Kutilmoj. — Specialaĵoj de terkultura kaj brutarkreskiga medio, de industrio, komerco, vivkondiĉoj kaj pliaj karakteroj: : : : Izaĵ interesaj. : : :

Konferencperiodo: fino de oktobro kaj novembro.

Invitantoj partoprenos je la kostoj de ĉi tiu multekosta entrepreno per almenaŭ 500 germ. markoj el malaltvalutaj landoj, per duobla sumo el ceteraj landoj.

Por ĝustatempa organizado urĝas tuja scilgo al:

**L. Kelety, Szászsebes** (Sebesul-Sasesc), Transilvanio, Rumanujo.

## Artaĵo-, Bildo-, Libro-Vendistoj kaj Art-Amikoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstriaĵ, turnu sin al

**SEPP OSTERER, GRAZ, AUSTRIO,**  
Gleisdorfergasse 5.

Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

## VITRO-PENTREJO

Emil Weiler, Freiburg i. Br.  
Starkenstr. 21 (Germanio.)

Speciala ateliero por unuarangaj „Svisaj-majstro-vitroj“ insignovitroj, emetoj ktp. en antikvaj specoj. — Petu prezojn kaj desegnojn. — Reprezentantoj serĉataj. — Eksporto ĉiulanden.

**S-o Johannes Tamverk,** Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildfl.) nur kun fraŭlinoj.

**Fritz Jauer,** Magdeburg-B., Marienstr. 2, Germanujo, deziras interŝanĝi papiliojn kun ĉiuj landoj, ankaŭ Germanujo.

**Peter Klopffleisch,** Düsseldorf, Germ., Ronsdorferstr. 81, korespondas per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Kiu sendas al mi 40—50 div. poŝtmarkojn stamp. de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Wilh. Luer, Corneliusstr. 78, Düsseldorf, Germ.

**Ĉokolad-laboristo** deziras korespondi kun kolegoj el ĉiuj landoj. Paulo Nath, Libera Urbo Danzig, Germ., Schmiedegasse 26.

**20-jara, gaja siriiano** deziras korespondadi kun fraŭlinoj de la tuta mondo. Karl Schmidt, V. B. G., Krumpental apud Eisenerz, Sillrio, Aŭstrio.

**F-ino Ellnjö Gerö,** Budapest VI, Kiraly-u. 47-II-16, deziras korespondadi kun gesamideanoj per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-o Karlo Zöldy,** Budapest IV, Deak Ferencz-u. 1-II (Pénzintézet központ) deziras korespondadi per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**25 gelnantoj de Esperanto** en la X-a distrikta kaj 35 gelnantoj en IX-a grupo deziras korespondadi. Por entuziasmiĝi ilin, oni sendu adresojn al k-do Adalberto Schuller, IX. ker. Angyal-utca 18-17, Budapest, Hung.

**S-o Bela Juki,** X. Hölgy-u. 48, Budapeŝt, Hung., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj fraŭlinoj kaj kun Japanio.

## La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memoraĵo por ĉiu esperantisto.

Presita sur luksa papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografajoj.

(Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tomo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 15 germ. mk. kaj sendkostoj.

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

## Intarsioj.

Marketro-fabrikojn el ligno, perlamoto kaj metaĵo por fabrikejoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

**H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj.**  
Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Libra kaj Arta Presejo

**Emil Friedr. Adolph**

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 88

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiuj presaĵoj por komerco kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Russa kaj Esperanta

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperanto, Angle, France, Germano ktp.

## Horloĝoj ĉiusepacaj

poŝ-vekhoroĝoj, malgrandaj vekhorloĝoj, star- kaj murhorloĝoj en plej bona kvalito. — Demandu prezaron! — Reprezentantoj serĉataj.

**HERMANN TOBUSCH,**  
horloĝ-eksperto, Freiburg i. Br.  
Kaiserstr. 16. (Germanio.)

## Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Ellersiek --- Wissmann-Str. 46 (Germanujo.)

Esperanto-eldonejo kaj libro-ekspertejo

liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

## „Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.